



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

Aliĝu al la
Eŭropa
Esperanto-
Kongreso 1976
Eindhoven, NL
=====

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

N-ro 43/1975 - 3 dec 1975
Aperas ĉiusemajne

Esperanto el Stutgarto

Stuttgart (pp) - En la dimanĉa elsendo "Funkfahrt ins Blaue" (Radioveturo en la bluaĵon) Süddeutscher Rundfunk, Stuttgart, (Sudgermana Radio), unua programo, disaŭdigis favoran intervuon pri Esperanto kaj parte ankaŭ konversacion en Esperanto, la 30an de novembro 1976, je la 13,10 horo.

Intervjuita estis konata esperantisto el Crailsheim, Bruno Vogelmann, kaj en la Internacia Lingvo interparolis s-ino Rück, same el Crailsheim, kaj s-ro Vogelmann.

Tiele komenciĝis la elsendo:

Vogelmann: Bonan tagon! Ni estas tre kontentaj, ke ni povas paroli en tiu sendaĵo, ĉu ne?

Rück: Jes, ni estas kontentaj!

Vogelmann: Ni havas okazon, iomete praktiki nian lingvon kaj la aŭskultantoj povas mem juĝi, ĉu ĝi sonas bone.

Rück: Oh jes! Ni volas fari tion. Mi ĝojas kaj salutas ĉiujn esperantistojn....."

Poste sekvis la germanlingva intervjuo.

La finon de la sendaĵo s-ro Vogelmann denove anoncis ankaŭ en Esperanto per la vortoĵo: "Kaj nun ni redonas al la centralo al Stuttgart."

Cetere Pilo-Press eksciis pri la elsendo ne nur de s-ino Vogel el Stuttgart, sed ankaŭ de Esperanto-lermantino el Nürnberg, kiu vojaĝinte al Stuttgart en vagonaro de iu sinjorino estis informita pri tio.

Decidoj de estrarkunsido de GEA

Bad Hersfeld (pp) - Kiel ni jam informis la 22-an kaj 23-an de novembro 1976 okazis en Bad Hersfeld estrarkunsido de Germana Esperanto-Asocio. Ĝi daŭris 11 horojn kaj estis traktitaj 29 tagordaj punktoj.

Oni decidis i.a., ke baldaŭ aperu varbilo en eldonkvanto de 100 000 ekzempleroj, kiuj estas disdonataj senpage al la membroj de GEA por varbaj celoj.

Krome estis buĝetitaj 1.000 GM por subteno de eksterlandaj prelegantoj ĉe lokaj Esperantokluboj.

La kasa stato estas en bona ordo kaj la jarraporto montras bonan rezulton laŭ informo de la GEA-estraro.

UK-peranto por FRG

La peranto por la Universala Kongreso en Ateno 1976 por FRG, s-ino Margarete Klünder, 443 Burgsteinfurt, Schützenstr. 13, havas nun jenan konton: Postscheckkonto Dortmund 27739 - 464

Paske al Eindhoven!

Aligu nun al la Eŭropa Esperanto-Kongreso, Paskon 1976 en Eindhoven!

La kongresa kotizo estas ĝis la 31.12.76 20 DM/n.gld. Sendu vian aliĝilon al Eŭropa Esperanto-Kongreso, Magnoliastr. 4, Eindhoven, NL, kaj vian pagon al la sama adreso kaj la nederlanda poŝtĉirkonto (poŝtĉekkonto Den Haag) N-ro 3379766. Ankaŭ germanaj esperantistoj aliĝu ĉe la sama adreso!

Zamenhof-festo en Munkeno

Ni denove atentigas pri la Zamenhof-festo en Munkeno, la 13an de decembro 1976, en hotelrestoracio "Landshuter Hof", Arnulfstr. 12. Komenciĝo je la 10a horo.

La Esperanto-Klubo Munkeno prezentos ekspozicion pri sia farita laboro dum la pasinta jaro kaj invitas ĉiujn bavarajn aktivulojn por preparoli organizaĵajn, informajn kaj varbajn problemojn ekde la 10a horo. Oni petas ankaŭ partopreni la komunan tagmanĝon en la restoracio. La Zamenhof-festo mem komenciĝas post la manĝo! Libroservo Pickel prezentas aĉeteblajn Esperantolibrojn!

Ankaŭ en Hamburgo

Zamenhof-festo okazos ankaŭ en Hamburgo la 13an de decembro. Detalojn ni ne eksciis!

Kaj en Nürnberg merkrede, la 10an de decembro, de la 18a - 20a horo, en modesta kadro!

Pri informado kaj instruado

Daŭrigo de raportoĵ kaj spertoĵ de agantoĵ en FRG

Anton Kronshage, Schwelm: Okazigi Esperanto-kurson fare de Esperanto-Grupo aŭ de Popola Altlernejo aŭ ekz. en Instituto por Eksterlando en Dortmund, do sur libera bazo laŭ tutlibera decido de la kursano(j) preskaŭ ne plu eblas hodiaŭ.

Mi instruas momente tri personojn, sed ĉiusemajne unu el ili ne ĉeestas pro malsaniĝo, pro familia kaŭzo ktp., do nur malrapide ni progresas, studas la lecionojn de "Wir lernen Esperanto".

Herno de 5 - 10 esperantistoj merkrede en la dua horo kunvenas por konversacii aŭ pli lerni pere de "Polyglott".....

Esperanto-Grupo Stuttgart: Informpetojn ni respondas per sendo de varbiloj, sed ni neniam sciigas, ĉu la petintoj aĉetis lernolibron, ĉu li lernis Esperanton.

Josef Weidacher, München: Sistema kaj daŭra kaj ĉiam denova laboro povus doni rezulton. Necesas kelkaj personoj kunlaborantaj. Kurso devas esti interesa, ne tro gramatikema. Kvalito de kursgvidanto garantias lernrestadon de la kursanoj.

Walter F.J. Walther, Kronach: Nenia reeĝo malgraŭ regula pergazetara informado.

Gustav Neumair, Pfaffenhofen: La informado estas bona, la intereso ankaŭ, la preteco por lerni Esperanton tute malbona.

Heinz Dieter Hartig, Bremen: Ambaŭ - informado kaj instruado - devas esti viglaj kaj interesaj - la interesuloj devas partopreni plezure! Pro tio gravas bone preparita programo. Noto de Pilo-Press: en Bremen nun lernas 17 personoj Esperanton, 8 personoj ĵus faris Esperanto-ekzamenon.

Helmut Rössler, stud-direktoro, Speyer: Du personoj venis senditaj de librovendejo al mi por aĉeti ĉe mi Esperanto-lernolibrojn!! Mankas lernolibroj por gimnazianoj kompareblaj kun la nunaj modernaj lernolibroj de la angla, franca ktp. lingvoj.

Wilhelm Renz, Dortmund: Kvankam la kondiĉoj por progagandi estas eksterordinare bonaj en nia urbo, pro la ekzisto de Rheinisch-Westfälisches Auslandsgesellschaft (Instituto por eksterlando), ni ne sukcesas trabati la muron de abnegacio kontraŭ nia lingvo. La tiel-nomata "Esperantokreis" (Esperantorondo) estas la restaĵo de iam tre grandaj grupoj, tielnomata neŭtrala kaj laborista....Se ni raportas el nia Esperanto Movado neniu venas, sed se iu rakontas pri bela vojaĝo, ekz. s-ro Jankowski pri vojaĝo tra Afriko aŭ s-ro Conseth el Mettmann prezentas memfaritan filomon, la salono estas plenkplena...Ofte la aŭskultantoj petas informojn pri vojaĝebleco, sed ne pri Esperanto.

Niaj klopodoj pri kurso estis plene sensukcesaj. Neniu sin anoncis. Estas la plena konvinko de la homo, ke la mondlingva problemo ja nun estas plene solvita, ĉar ja ĉiu infano havas la eblecon lerni la anglan lingvon. Se ni ankaŭ ne povas havigi lernemulojn, nia celo estas konvinki la homojn, ke Esperanto ne mortis, sed estas ofte aplikata.

Rudolf Brand, Bamberg: Ĉiam la samaj aferoj! Ne laciĝu!

Harald Schicke, Hamburg: La Esperanto-informiloj plejofte estas mal-bonkvalitaj, do ne taŭgaj. Devus ekzisti konstantaj kursoj, t.e. ke oni povas libere elekti horon, tagon ktp., ekz. en lingvo-laboratorioj.

Walter Kaukal, Neustadt/Weinstr.: Se ĉiu esperantisto oferus 5 aŭ 10 GM monate por la disdono de informa materialo, ĉiuj loĝantoj scius pli pri Esperanto.

Se ĉiu esperantisto edukus nur unu aŭ du junulojn (aŭ plenkreskulojn), la Esperanto-Movado havus sufiĉe da membroj.

Nur, se Esperanto estos instruata devige dum 2 horoj semajne en ĉiuj lernejoj,... nur tiam estos Esperanto fakte la interkompreniĝa lingvo por Eŭropo (kaj ankaŭ por la tuta mondo).

- Mankas informaj flugfolioj (kun mallonga teksto) en germana lingvo.
- Mankas taŭgaj afiŝoj en germana lingvo.

(Broŝuroj kun longaj tekstoj, ekzemple la broŝuro de d-ro W.

Bormann, ne taŭgas por la vasta informado kaj propagando).

- Mankas kunlaborantoj kaj donacantoj por la informado kaj instruado.

Niaj personaj klopodoj estas nur mallongaj paŝoj sur la "Esperanto-vojo".

Esperanto en Radio

Varsovio: Ĝis la 3a de decembro en la Esperanto-Redakcio de Pola Radio eniris dum 1976 pli ol 4 400 korespondataĵoj. Do, oni pli kaj pli alproksimiĝas al la kosma nombro 5000. Cetere, dum novembro la Esperanto-Redakcio de Varsovio ricevis pli ol 500 korespondataĵojn, inter ili pli ol 40 el FRG. - La Esperanto-Ekspreso de 30.11./1.12. diskonigis du interesajn intervjuojn. Nun ni fakte scias laŭ informo de la ĉefredaktoro de Literatura Foiro, ke Norda Prismo definitive mortis, kaj ke Literatura Foiro volas daŭrigi ĝian tradicion. Espereble LF sukcesos. Pri BONA ESPERO, la Esperantokomuno en Brazilo, regas ankoraŭ neklara imago. La intervjuo kun ges-roj Grattapaglia kaj s-ro Diniz kontribuis al objektiva informado pri tiu nobla iniciato, kiu vere meritas subtenon de ĉiuj esperantistoj. Vere, sinjoro Uspienski eldiris, kion multaj homoj, kiuj konas la familion Grattapaglia, sin demandas: Kial gesinjoroj Grattapaglia faris tian "revolucionan paŝon" kaj translokiĝis al Bona Esperanto. Nun ni ricevis respondon el "unua mano".

Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj valoraj objektaĵaj premioj

atendas la eksterlandajn geaŭskultantojn de Pola Radio, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj de nia konkurso:

- 1) Kion vi opinias pri la rolo de la sindikatoj en la solvado de la aktualaj problemoj de la laborula mondo.
- 2) Kion vi scias pri la kreiĝo kaj agado de la Monda Federacio de la Sindikatoj?
- 3) Kiujn virinojn vi konas, kiuj – laŭ via opinio – ludis grandan rolon en la internacia vivo aŭ havas meritojn por via lando?

Respondo al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Polskie Radio, PL-00-950 Warszawa, Poŝtkesto 46, Pollando

– en kovertoj signitaj per la devizo „Konkurso” –

ĝis la 31-a de decembro 1975 j. (decidas la dato de la posta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1976.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Ni deziras bonsancon en la lotado de la premioj.

Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO
Warszawa